| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Heinrich Heine, | Heinrich Heine, | Heinrich Heine, | Heinrich Heine, | Heinrich Heine, |
| **Die Lorelei** | **Lorelej’** | **Lorelay** | **[Ne scias mi, kio okazis]** | **Lurleia** |
| | *tradukita de Leopold Elb* | *tradukita de Hans-Georg Kaiser* | *tradukita de Paul Gottfried Christaller* | *tradukita de N. N. 01* |
| | *Tiu traduko estas poste iom modifita de aliuloj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.* | | *El la “Libro de la kantoj”, parto “La Reveno”.* | |
| Ich weiß nicht, was soll es bedeuten, | Ne scias mi, kial mi estas | Min kaptas malgaj’ en la koro, | Ne scias mi, kio okazis | Ignoro, quid id sibi velit, |
| daß ich so traurig bin; | Malgaja en la kor’. | pro kio tia trist’? | al mia tristema kor’: | Tristissimus cur sim, |
| ein Märchen aus alten Zeiten, | Antikva fabelo restas | Fabel’ el antikva foro | Antikva legendo min kaptis, | Antiqui aevi fabellam |
| das kommt mir nicht aus dem Sinn. | Por ĉiam en mia memor’. | ne lasas de mi kun persist’. | ne cedas el mia memor’. | Cur saepe volverim. |
| | | | | |
| Die Luft ist kühl und es dunkelt, | Vespero jam ekmalheliĝas, | Aere fridetas, trankvilas, | La Rejno fluadas trankvile | Vesperascit et frigescit, |
| und ruhig fließt der Rhein; | Fluadas la Rejn’ en trankvil’, | malhelas jam la Rejn’. | murmuras kiel mister’, | Et Rhenus leniter it, |
| der Gipfel des Berges funkelt | La supro de l’ monto lumiĝas | La monto surpinte brilas | la supron ŝtonegan orumas | Cacumen montis lucescit, |
| im Abendsonnenschein. | En vespersuna bril’. | vespere en rava scen’. | sunbriloj de la vesper’. | Dum Phoebus occidit. |
| | | | | |
| Die schönste Jungfrau sitzet | Belega knabino jen tronas | Tre ĉarma feino sidas, | Plej bela virgino jen sidas | Sedet in summo montis |
| dort oben wunderbar, | Kun ora juvelar’, | jen supre por ador’; | mirinda sur la montet’ | Virgo pulcherrima, |
| ihr goldnes Geschmeide blitzet, | La belan vizaĝon kronas | la ora ornamo ridas; | kaj ŝia oraĵo radias, [4] | Auro nitet gemma frontis, |
| sie kämmt ihr goldenes Haar. | Mirinde la ora harar’. | ŝi kombas harojn el or’. | ŝi logas kiel magnet’. | Se pectit auricoma. |
| | | | | |
| . . . | . . . | . . . | . . . | . . . |

[4] En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: “kaj sia oraĵo radias”, kun “sia” anstataŭ “ŝia”’. Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Sie kämmt es mit goldenem Kamme,<br>und singt ein Lied dabei;<br>das hat eine wundersame,<br>gewaltige Melodei. | Ŝi uzas kombilon el oro<br>Kaj dume kantas ŝi.<br>Mirige tuŝas al koro<br>Sorĉiga la melodi'. | Ŝi kombas per ora kombilo<br>kaj kantas kun pasi';<br>mirigas min la elbrilo<br>kaj forto de l' melodi'. | Ŝi kombas la oran hararon<br>abundan per ora kombil',<br>kantante misteran lidon,[5]<br>ravantan kiel sunbril'. | Aureolo pectine pectit,<br>Carmen canens procul,<br>Mirandum id habet modum<br>Nec non virilem simul. |
| Den Schiffer im kleinen Schiffe<br>ergreift es mit wildem Weh;<br>er schaut nicht die Felsenriffe,<br>er schaut nur hinauf in die Höh. | Kaj sopiregon eksentas<br>Ŝipisto dum sia vetur';<br>Rifaron li ne priatentas,<br>Al monto rigardas li nur. | Ŝipisto ŝipeton gvidas,<br>lin kaptas ve' de ekzalt'.<br>Li ja la rifojn ne vidas',<br>li vidas nur supren sen halt'. | Ŝipisto en sia ŝipeto<br>kaptiĝas per stranga dolor',<br>la rifon li tute ignoras.<br>atentas nur ŝin kun fervor'. | In cymba navitam mille<br>Angores feri tenent,<br>Non videt scopulos ille,<br>Ocli non si sursum vident. |
| Ich glaube, die Wellen verschlingen<br>am Ende Schiffer und Kahn;<br>und das hat mit ihrem Singen<br>die Lorelei getan. | Mi kredas, ke dronos finfine<br>Ŝipisto kun sia boat',<br>Kaj tion kaŭzis feine<br>La Loreleja kantad'. | Mi kredas, ke ondoj tiras<br>la ŝipon funden de l' Rejn';<br>kaj tio de l' kant' eliras<br>de Lorelaj-siren'. | Mi kredas: la ondoj englutas[6]<br>ŝipiston, ŝipeton je l' fin',<br>kaj kulpa pri tio nur estas<br>kantado de la virin'. | Opinor undas devorare<br>Nautam cum navicula,<br>Effecit solo canendo<br>Lurleia id dea. |
| ... | ... | ... | ... | ... |

[5]En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

[6]Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17), publikigita 1823.*

*Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)*

*Aus dem Werk "Buch der Lieder", Kapitel "Die Heimkehr", Abschnitt II. Siehe auch ein* `http://gutenberg.spiegel.de` *unter:* `http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xd=1131&kapitel=12&cHash=eb14eca2272#gb_found`. *Vidu ankaŭ:* `http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html`. *La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon* `http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html`.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Leopold Elb *(†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso" de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Hans-Georg Kaiser *(Cezar, ∗1954-05-21).*

*Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Paul Gottfried Christaller *(∗1860-08-21 – †1950-12-31).*

*Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abscbnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo* `http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller`, *kunfoto de li.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

*Arg-2-179 (2010-02-11 14:00:52)*